

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 178
10. 2. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Burlin, L. K.

Administracio:

Horrem b. KÖln, Germanlando

Abonprezo


po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 80%; por kiuj alla
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
es „Internacia Komerco“ la duoblo

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Radiotelefona parolado pri „Turismaj allogaĵoj ĉeĥoslovakaj“.




Praha. — Kastelo „Hradčany“.

Plioftiĝas la praktika apliko de Esperanto pere de la radiotelefonio. Por ĉiuj, kiuj ne jam estas feliĉaj posedantoj de radiotelefona ricevaparato, ni plezure publikigas hodiaŭ la interesan paroladon, kiun faris s-o A. Pitlik, supera komisaro de la ĉeĥoslovaka komerca ministerio, la 31 januaro. La aldonitaj bildoj vidigas kelkajn el la menciitaj belajoj. La parolado ebligas bonan okazon por varbado koncerne la praktikan uzon de Esperanto tra la tuta mondo.

Estos laŭcele, informi pri eventuala utiligo la paroladinton laŭ adreso: s-o A. Pitlik, supera komisaro de ĉeĥosl. kom. min., Křemencová 17, Praha II.

Turismaj allogaĵoj ĉeĥoslovakaj.

Ĉeĥoslovaka respubliko, naskiĝinta en la jaro 1918 el la ruinoj de aŭstria-hungara imperio, estas teritorio ne sole historie interesinda — ĝia ĉefurbo Praha jam en la 14-a jarcento estis centro de la eŭropa kulturo kaj la ĝis jaro 1619 restadejo de romgermanaj imperiestroj —



Moravia Kras. — Stalakrita kolono.

sed okupas ankaŭ rilate al turismaj memorindaĵoj kaj naturaj belajoj unu el la ĉefaj lokoj de la tutmonda konkurenco. Ne vane ĉeĥosl. respubliko estas nomata en oficiala ŝtata himno „Tera paradizo!“

Praha.

Allogaĵo jam estas la ĉefurbo Praha mem, kiu laŭ eldiro de la plej eminentaj vojaĝistoj estas kvara plej bela urbo eŭropa; fondita en legenda epoko kaj memoranta la ĉeĥan gloron, ĝi estas por la fremdulo ne sole viva muzeo de mezepokaj arkitekturo kaj antikvaĵoj, sed ankaŭ historia loko unuaranga, kie ĉiu ŝtono rememorigas nin pri heroo dramo, ĉi tie okazinta, kie tre ofte komenciĝis kaj finiĝis gravaj historiaj okazintaĵoj, kiuj ne unufoje donis karakteron al la historio de tuta Eŭropo.

Kio logas la fremdulojn al

Praha, kies rava natura situacio, vera ĝuo por la okuloj, estis kantlaŭdita de Chateaubriand, Goethe, Humboldt, Marcel Prévost, Leger kaj William Ritter, kio igis tiun ĉi metropolon „Romo de la nordo“, estas Antikva Praha. Kiel respektinda atestanto de glora historio ĉeĥa rigardas majeste mal-supren ampleksa kastelo Hradčany, fondita en la 9a jarcento kun la katedralo de Sankta Vito el la 14a jarcento, kies turoj helpas ĝui ravan vidon je Praha, trafata de vasta argenteonda riverego Vltava (Molilavo), transarkajita per 9 pontoj, el kiuj la plej malnova „Ponto de Karolo“ el la 14a jarcento interkomunikas la plej antikvajn partojn de Praha: Malnovan urbon kun malgranda kvartalo kaj Hradčany, kie ĝis nun konserviĝis nedifektita baroko kaj rokoka stiloj. Kiom da grandvalora antikvaj preĝejoj, palacoj kaj ejoj de feliĉaj revoj de estintaj nobelaj gardenoj, kiom da artistaj portaloj, zigzagaj stratoj kaj pitoreskaj mezepokaj urbanaj dometoj kaŝas sin ĉi tie!

Estas memkompreneble, ke ankaŭ la moderna Praha, kultura centro de la ŝtato, kiu en siaj 42 kvartaloj havas preskaŭ unu milionon da loĝantoj, estante grava kruciĝo de internaciaj transportaj linioj kaj okupante per sia sanstato la sesan lokon inter la plej sanaj urboj eŭropaj, disponigas al la fremdulo multe da interesaĵoj.

Ĉeĥoslovakaj mondbanlokoj.

En la mondo ne estas lando, kiu paradas per tiom da banlokoj kiel Ĉeĥoslovakio, kaj ne ekzistas malsano, kiu ĉi tie ne estas kuracebla! En Ĉeĥoslovakio estas senkompareblaj specialaĵoj kuracaj, kiujn miloj kaj miloj da malsanuloj elserĉadas, por retrovi la perditan sanon kaj ĝui neforges-eblajn impresojn de la banloko, ne sole riĉa je naturaj belajoj sed prezentanta rilate al banterapio, hoteloj kaj distraĵoj la plej modernan komforton.

En Ĉeĥoslovakio troviĝas pli ol 170 mineral-kaj sanigofontoj kaj pli ol 40 belege-situaciaj banlokoj, el kiuj Karlovy Vary (Karlsbad), Mariánské Lázně (Marienbad), Františkovy Lázně (Franzensbad) kaj Píšťany estas mondfamaj.

Unikaj en la mondo estas la sanigfontoj de Karlsbad, trovitaj en 14a jarcento de reĝo Karolo IV-a. Neordinara ekfloro de ĉi tiu mondbanloko datumas de post la komenco de la 19a jarcento, de kiam ne sole Eŭropo sed ankaŭ la ceteraj mondpartoj sendadas ĉi tien siajn malsanulojn kaj bangastojn. La fontoj, havantaj naturan temperaturon de 36—73° C., kuracas malsanojn de la stomako, intestaro, hepato, reno, lieno, malsanojn de la virinoj, artritron kaj diabeton. Dumsezone de majo ĝis septembro Karlsbad estas plene da bangastoj, allogitaj ne sole per mirakla sanigoforto de la fontoj, sed ankaŭ de modera klimato, belega ĉirkaŭaĵo kaj internacia publiko, apartenanta al la plej distingigitaj klasoj de la homaro. —

De la sama karaktero, sed malvarmetaj estas la en la 16a jarcento malkovritaj fontoj de Marienbad, kiu estis favorata somerrestadejo de la angla reĝo Eduardo II-a kaj kie ofte la ĉefaj diplomatoj eŭropaj solvadis urĝajn demandojn politikajn. La banloko, kie oni kuracas korputmalsanon, artritron, kor- kaj renmalsanojn, diabeton kaj arteriosklerozon, estas plengita per unuaranga komforto, kontentiganta eĉ plej altajn postulojn. —

Pli sanigejo ol somerrestadejo estas Franzens-



Karlovy Vary-Karlsbad. — Promenejo „Mühlbrunn“.

bad, kies minerala torfo estas mirakla kuracilo por virin- kaj kormalsanoj. —

Jam en la 8a jarcento estis konata banloko Teplice-Sanov (Teplitz-Schönau), kiu estas vera Mekka de suferantoj je reŭmatismo.

Unu el la plej junaj sed plej esperdonaj estas banloko Jáchymov (Joachimsthal), kie en 1905 oni konstatis la plej fortajn radioaktivajn fontojn, per kiuj oni ne sole sanigas, sed el kiuj oni ankaŭ fabrikas radiumon. —

Citindaj estas ankoraŭ du banlokoj slovakaj: Píšťany, mondfama per siaj sulfuraj fontoj, varmaj pli ol 60° C., kaj sulfura ŝlimo, kuracanta reŭmatismojn kaj aliajn artikmalsanojn, Trenčianské kaj Trenčianské Teplice, kiu, havante samkarakterajn fontojn, estas samtempe luksa somerrestadejo. —

El multaj junaj banlokoj, kies minerala kaj saniga riĉeco estas rimarkinda, menciindaj estas precipe Poděbrady en Bohemio, kie oni sukcesplene kuracas kormalsanojn, diabeton, artritron kaj haŭtmalsanojn, kaj Luhačovice en Moravio, kies inhalatorio estas plej moderna faka entrepreno en Eŭropo.

Moravia Kras.

Al la plej interesaj vidindaĵoj de Ĉeĥoslovakio apartenas Moravia Kras (Karsto), proksime de la urbo Brno (Brünn), ĉirkaŭante la plej profundan abismon Macocha. Moravia Kras prezentas subteran labirinton de grotoj, koridoroj kaj salonegoj.

En fermitaj valoj la akvo sur 30 lokoj malaperas subite sub la teron, kie ĝi 500 m profunde sur surfaco de 50 kvadratkilometroj kreis senfinan regnon stalaktitan kaj stalagmitan, kiu per sia amplekso, riĉeco de eksterkufimaj grupoj kaj formoj kaŭzas ekmiron de vizitantoj, kiuj senpene nun povas viziti ĉe la fundon de la abismo Macocha, kiu en la lasta jarcento estis celo de multaj sciencaj ekspedicioj. La salonego de Masaryk, malkovrita en la jaro 1920, alirebla sole sur akva vojo de la subtera rivero Punkva, estas vera mondmiraklo. — La grotaro estas elektre lumigita kaj kunigita per aŭtobusoj kun rapidvagonara stacio Blansko.

Montegaro Tatry.

En ĉeĥoslovaka respubliko estas ankaŭ multe da somerrestadejoj, el kiuj la plej luksaj troviĝas en montegaro Tatry, nomataj „Ĉeĥoslovakaj Alpoj“, leviganta ĉe la nordlimo de Slovakio kaj atinganta per sia monto Gerlach altecon de 2665 m. Sur malgranda teritorio, longa 25 km, komforte kunigita per rektaj rapidvagonaroj kun tuta Eŭropo, koncentriĝas grandparte ĉiuj specoj de montegaj naturaj belaj, kiuj en multaj rilatoj superas ĉe la Alpoj, nome: glaciokoj, ĉarmaj lagoj, akvofaloj, idiliaj valoj, karakteriza regno de floroj kaj montegara faŭno. Montegaj supreniroj estas plejparte sendanĝeraj, kvankam ĉe la plej riskemaj altistoj trovas ĉi tie ankaŭ siajn plezurojn! —

En Tatry estas vico de somerrestadejoj, konstruitaj 900—1350 m alte, el kiuj la ŝtataj ŝtrbské pleso kaj Tatranská Lomnica, same privata Smokovec, posedante luksajn kaj komfortajn hotelojn, estas mondkonataj.

Socia vivo.

Laboraj juĝistaroj en ĉeĥoslovakio.

Leĝprojekto estas preparata en la Ĉeĥoslovaka Ministerio de Justeco por etendi la poverojn de la Industriaj Juĝistaroj. Tiuj ĉi estos nomataj Laboraj Juĝistaroj, kaj traktos ĉiuspecajn disputojn inter mastroj kaj laboristoj okaze de okupado.

Oni proponas starigi Laborajn Juĝistarojn en ĉiuj lokoj, kie ili estas necesaj. Ili konsistos el prezidanto kaj anstataŭanto, kiuj estos profesiaj juĝistoj, kune kun iuj asessoroj, unu duono mastroj kaj alia duono laboristoj.

La Laboraj Juĝistaroj estos kompetentaj por trakti ĉiujn disputojn rilatajn al la jenaj demandoj: Deprenoj el salajroj, monpunoj ktp.; demandoj pri komenco, daŭro kaj ĉeso de okupado; postuloj pri pensioj kaj aliaj monhelpoj; eldono kaj enhavo de atestaĵoj pri servado, rekomendaĵoj ktp.; demandoj pri luĉeso kaj luprezoj de loĝejoj luigitaj de mastroj al laboristoj; disputoj inter laboristoj pri laboroj entreprenitaj komune.

Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Astronomio.

Kometoj en la jaro 1924.

Ĝis nun ni konas 25 periodajn kometojn, el kiuj dum la nuna jaro revenos 3. En novembro ni vidis la Eucke-kometon. Ĝia rondira periodo estas 3,3 jaroj, la malplej granda el inter ĉiuj kometoj. Ĝis nun oni vidis ĝin 34 foje. La astronomoj atendas ĝian revenon per ekscita intereso, ĉar ĝi revenas ĉiam 1—3 horojn pli frue ol oni povus atendi. La alia estas la Tempel-kometo kun 6,5 jara periodo. Dum ĝia lasta perihelio en 1918 oni ne plu vidis ĝin kaj estas dubo ĉu ĝi ne perdis. La lasta estas la Tuttle-kometo kun 12,2 jara periodo. Ĝis nun ĝi ĉiam precize alvenis, oni ankaŭ nun konjektas ĝian revenon.

Jozefo Major, Budapeŝto.

Metalurgio.

„Valo de l' morto“.

En Kaŭkazo ekzistas timigaj lokoj, nomataj „valoj de l' morto“. Kiam homo aŭ besto dum kelke da tempo estis tie, ili malsaniĝas, paraliziĝas kaj preskaŭ ĉiam mortas. Indigenoj ĉirkaŭbaras tiujn lokojn. Tie estas domoj, en kiuj ĉiuj loĝantoj formortis, malsaniĝintaj ĉiuj je sama terura paralizo. Jardekojn ili staras neloĝataj, kaj homoj preteriras dirantaj sorĉajn vortojn kontraŭ „diabla forto“.

Scienculoj longe ne povis solvi ĉi tiun terurigan enigmon, kaj nur antaŭ nelonge ili konstatis, ke tiu „diabla forto“ estas nenio alia ol riĉegaj provizoj da radiumo. La dissidentaj radium-radioj estis la kaŭzo de la mortiga paralizo. Laŭ opinio de rusaj scienculoj Paličinski, prof. Baskakov k.a. ĉi tiuj „valoj de l' morto“ entenas plej grandajn en tuta mondo provizojn da radiumo, kiu kuŝas proksime de tersurfaco.

Por serĉi tiun riĉaĵon, nuntempe oni preparas ekspedicion de rusaj scienculoj al tiuj enigmaj lokoj en Kaŭkazo.

H. Frank, Kazan (Tatara sovjeta respubliko).



Tatry. — Sur „Koprovský Štít“ (2370 m).

Vintraj sportlokoj.

Depost la VII-a Internacia Skikongreso, okazinta en la jaro 1923 en Ĉeĥoslovakio, promesdone evolucias ĉi tie ĉe la vintraj sportoj, al kiuj plej konvenan lokon disponigas la ĉelimaj montaroj. — Plej konataj vintraj sportlokoj, vizitataj ankaŭ de fremduloj, estas Spindlerův Mlýn (Spindelmühle), Janské Lázně (Johannisbad), ĉirkaŭaĵo de Keilberg kaj Špičák en Bohemio, Nové Město en Moravio kaj Štrbské pleso kaj Tatranská Lomnica en Tatry.

El la dirita estas videble, ke ĉeĥoslovaka respublika per siaj turismaj allogaĵoj povas konkuri kun iuj aliaj landoj eŭropaj, kaj sur tiu ĉi kampo eĉ superas kelkajn. Vizitu Ĉeĥoslovakion kaj konvinkigu! —

Geografio.

Kolonigado de norda Rusujo.

La sovetregistaro preparigas projekton pri koloniigado de l' norda marbordaro kaj pri intensigo de tiea ekonomia vivo. En la unua vico staras regionoj de Murman kaj Peĉora, tiu ĉe la enfluo de l' samnoma rivero en la Glacian Maron kaj la orienta de ĝi lokita regiono de l' zirjanoj. Laŭ la projekto ĉiu ekkulturisto ricevos parcelon de 120 desjatin'oj (1 desjatina = 1,0925 da hektaro).

R. L-on.

Jubileo de radiumo.

La 26 dec. en la vasta amfiteatro de Sorbonne en Paris oni ĵus solenis la dudek kvinan datrevenon de la genia eltrovo de radiumo en ĉesto de la registaro kaj de la tuta franca sciencularo kaj eminentularo.

Efektive, ĝuste antaŭ dudek kvin jaroj, Prof. D-o Pierre Curie la unuan fojon publike prezentis al la franca Scienca Akademio sian eltrovon, kiu devis mondfamigi lian nomon. Li tro frue mortis pro banala okcidento, sed restis lia vidvino kaj kunlaboristino, kiu sindone kaj obstine daŭrigas liajn serĉadojn.

Venis do por ŝi la tago de la oficiala dankemo. Inter la brila kunveninto, dekstre de s-o Millerand, prez. de la respubliko, ŝi modeste sidis, maldika virino en nigra robo, kun vizaĝo delikata, portante okulvitrojn, tute pala pro la multaj laboroj dum noktoj, pli pala ankoraŭ pro la primemoroj kaj kormovaj sentoj de la momento nuna. Jen do aŭtoritata voĉo laŭtigis por glorigi la nomojn de ambaŭ getrovintoj kaj la miraklon de l' radiumo, dum en la ĉambrego amasigita popolo aplaudis, konfuzis, sed profunde sentante la pracon de tiu ĉi honorigo.

Certe de ĉiuj estas konataj la bonfaraj rezultoj jam atingitaj per radiumo en la kuracarto kaj aparte pri kancero; sed la ĉefa rolo de radiumo montrigis en fiziko-kemio, ĉar ĝi ekkonigis al ni la plej intime profundajn sekretojn de la konsisto de la materio kaj de la atomoj. Kaj jam ĝi ebligas antaŭvidi la efektivigon de la malnova revo de la alkemistoj pri la transaliigo de la metaloj. Sed ĉi tiu nuna gloro de radiumo kaj de Curie estas nur komenco; ni fidu je la estonteco, kiu promesas al ni plej belajn kaj senlimajn esperojn.

A. Esselin, Nancy.

Tekniko.

Progresoj en la konstruado de vapor-kaldronoj.

Al tiuj ĉi progresoj apartenas ĝenerale la jam ĝenerala uzado de trovamiginta vaporo. Tamen la trovamiginta vaporu sentigas ankaŭ siajn malutilojn. Bona konstruado de hejtiloj por trovamiginta vaporu supozigas pli lertan aranĝon de tiaj hejtiloj kaj pli precizan kalkulon je elasteco ol tio ĝis nun okazis. Precipe la modeligo de tubokunigaj rastoj kiel ankaŭ tiu de armaturoj estas tre delikata tasko. Alia progreso estas komencata per la ĉiam plialtigata uzina premo kaj efekto. Tensioj de 10 ÷ 12 atmosferoj estas hodiaŭ ordinarioj. Ankaŭ la efektoj de brulmaterialo kaj la hejtsuraco konstante pliboniĝas.

Precipe evidente ni vidas tion ĉe flamtubaj kaldronoj.

Spite ĉiujn progresojn la vapormaŝino restas ankoraŭ la plej malŝparema labormaŝino rilate al energioferdo.

Internacia trafiko.

Aerveturado.

En Angluo oni laste eksperimentadis per malgrandaj (7½ ĉevalpovoj) aviadiloj. La rekordo estis atingita de s-o Hinkler, kiu flugis 1000 mejlojn dum la semajno. Oni kalkulis, ke li flugis pli grandan distancon ol de Romo ĝis Londono kaj uzis benzinon nur por £ 1.—.

J. M.

La Zeppelin'a aersipo por Ameriko.

La granda poŝtaersipo, kiu estas konstruata por Usono en la germana Zeppelin-konstruejo kaj proksimiĝas al sia finkonstruo, signifos gravan periodon en la evoluo de la ekspedado de poŝtaĵoj trans la oceano. Se oni pripensas per kiaj oferoj la ŝipkonstruistoj en la lastaj 30 jaroj pli kaj pli altigis la rapidecon de la ŝipoj, ke ebligis fari la vojaĝon de Eŭropo al Ameriko en 6 tagoj tiam estos giganta faro, ke la tempo por la ekspedado de poŝtaĵoj kaj pasaĝeroj per la aertrafiko denove estos mallongigita je pliaj 2½ tagoj. Estas heroaĵo de la tekniko.

La aersipo, kiu portas la konstrunumeron LZ 126, estas konstruata laŭ komiso de la germana registaro por Usono. Dum la lastaj 23 jaroj estis konstruitaj entute 116 Zeppelinoj; 25 antaŭ la mondmilito, 88 dum la milito kaj 13 post ĝi. Por la grandeco de la aersipo estis decidita la limiga postulo de la ŝtatoj, koaliciitaj kun Usono, ke la aersipo ne estu pli granda ol la plej granda dum la milito konstruita Zeppelin'a aersipo.

La gasvolumeno estas 70000 kubo-metroj, la plej granda longeco estas 200 metroj, la plej granda diametro 27,64, la plej granda alteco 31 metroj. La gondoloj por la motoroj estas boat-simile konstruitaj. La alpendigo de la gondoloj al la ŝipo okazos per draŝnuregoj, kaj de la ŝipo kondukas en ĉiun gondolon ŝtupetaro. La motoroj estas por la speciale grandaj postuloj nove konstruitaj kaj havas 40 ĈP. La gvidista gondolo estas en interitrito kun la aliaj gondoloj per laŭte parolanta telefono.

Por la ŝipanoj ekzistas jenaj ĉambroj: 1. kajuto por la komandanto kun lito, tablo, seĝo kaj ŝranko; 2. du dormĉambroj por la oficioj po du litoj kaj du sidiloj; 3. restadejo por la oficioj kun tablo kaj benko; 4. ses dormejoj por la ŝipanoj po du litoj kaj du sidiloj; 5. du restadejoj por la ŝipanoj kaj 6. unu lavejo: Ĉiuj tiuj ĉi ejoj troviĝas en la ŝipkorpo mem super la gondoloj.

La ejoj por la pasaĝeroj troviĝas en la speciala pasaĝer-gondolo, kiu estas alkonstruita al la gvidista gondolo. Ĉi tie ekzistas 5 kajutoj, instalitaj kiel Pullman-dormvagono. Dumtage la malsupraj litoj estas aranĝitaj kiel sofoj kaj la supraj estas malsuprenigitaj kiel ties apogiloj; ĉiuj kajutoj havas grandan fenestron. Ĉe la baborda flanko troviĝas post la pasaĝerejo 1 lavejo por sinjoroj, 1 lavejo por sinjorinoj kaj 2 necesejoj. Ĉe la dekstra flanko troviĝas la kuirejo kies vandoj, plafono kaj planko estas faritaj el aluminio kaj kiu posedas elektran fornon. Ankaŭ por la bona aerumado de la ejoj estas zorgata. Por la pakajo, poŝto kaj ŝarĝo troviĝas en la ŝipkorpo specialaj ejoj.

La plej granda rapideco de l' ŝipo per ĉiuj motoroj estas 122 km po horo; la normala vojaĝ-rapideco kun 5 motoroj estas pohore 108 km. Per tiu ĉi rapideco la aersipo povas ekspedi krom la ŝipanojn 10 tunojn da poŝtaĵoj, 8 pasaĝerojn, 1 poŝtoficiston kaj 30% da rezerva benzino por kazo de kontraŭ-ventoj por pli ol 5300 km.

Joh. Bernhard, München.

Kolosa ponto.

El Sydney (Aŭstralio) oni anoncas: Super la loka haveno oni konstruos novan ponton, kiu estos la plej granda sur la tero. La konkursoj por konstruado kaj konstruado jam estas elskribitaj. La ponto pezos 50000 tunojn kaj kostos 5 milionojn da anglaj funtoj. Ĝis nun anoncis sin multaj konstruktistoj kaj firmaoj, sed neniu ankoraŭ ricevis komision.

Nova linio de senfadena telegrafo inter Francujo kaj Indo-finujo.

Ĉi tiu nova linio de 10000 km inter Bordeaux kaj Saigon estas inaŭgurita en januaro. Nun ekzistas en la francaj kolonioj 59699 km da telegrafaj linioj kaj 50 stacioj de T. S. F. Oni devas aldoni francan stacion sur la teritorio de la respubliko Liberio kaj alian en Finujo. La ĉefaj koloniaj stacioj estas Saigon, Bamako, Brazzaville (Kongo) kaj Tananarivo (Madagaskaro).

Komerco.

Limigo de ledeksporto en Francujo.

La 15. januaro okazis en la Komerca Ministerio en Paris kunveno de la Konsila Komisiono de feloj kaj ledoj, por diskuti proponon pri limigo de ilia eksporto el Francujo. Estis decidite akcepti la nunan staton atendant ke la franca registaro akceptu ĝeneralajn aranĝojn por protekti ĉiujn francajn industriojn.

Aktuala politiko.



Woodrow Wilson +.

La 2. februaro mortis la eksprezidanto de Usono Woodrow Wilson. Li farigis mondfama dum la mondmilito, kiam li antaŭ la Kongreso de Usono proklamis solene la 14 punktojn, kiujn li proponis por la paktotraktato. Wilson naskiĝis en 1856 en Staunton (Virginia). Li studis historion, juron kaj filozofion. Poste li estis Prof. de historio kaj nacia ekonomio en pluraj universitatoj. En 1911 li transiris en la administracian servon de la registaro kaj farigis guberniestro de New Jersey. Kvankam politika novulo li estis elektita prezidanto de Usono en 1912 post kiam la demokratoj usonaj en la sama jaro agitis por li kaj proponis lin kiel kandidaton.

Liaj 14 punktoj ĝis nun nur restis programo. La historio montras poste, ĉu lia famo atingos saman gradon kiel tiu de Washington, Monroe kaj similaj eminentuloj amerikaj.

R. K.

Socialista Respubliko de apudvolgaj germanoj.

Laŭ telegramo de la 9.1. el Pokrovsk, la 11-a kunveno de la sovetoj de la aŭtonoma regiono de apudvolgaj koloniistoj germanaj (t. e. Germana Komunumo) estas solene proklaminta la Aŭtonoman Socialistan Sovjetan Respublikon de l' Germanoj apudvolgaj.

R. Lorentson, Tallinn.

Radioparolado pri Lenin.

El Moskva ni lastminute ricevis jenan telegramon: „(Moskva 6.2.20, 15 h.) 21 februaro dekkvara horo dekkvin minutoj mezeŭropa tempo Moskva radio-demonstracio funebra pri Lenin. Ondolongo trilmil ducent metroj, Drezno.“

Posedantojn de radio-ricevaroj sendube interesos tiu ĉi sciigo. Por la aŭdorezultato oni informu la estraron de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, P. K. 630, Moskva Sov.-Ruslando.

Statistiko.

London kaj Paris ofte konkurencas pri la nombro de akcidentoj. Ŝajnas ke la brita ĉefurbo ĉi tiun jaron gajnis la konkurencon. Laŭ oficiala statistiko publikigita en gazetoj la mortigitaj strataĉcidentoj okazintaj en Londono dum la 9 unuaj monatoj de 1923 estis 478. En Paris la mortigitaj okazoj per aŭtomobiloj estis nur 198 por la sama jaro.

A. Esselin, Nancy.

Filatelio.

Novaj poŝtmarkoj en Polujo.

Noveldonitaj poŝtmarkoj estas 5000 mk. knn portreto de Kopernik (ruĝa) kaj 5000 mk. knn portreto de Konarski (bruna). Krom tio aperis kelkaj provizoraj poŝtmarkoj. Tiuj ĉi lastaj estas: a) la 20 mk. pm. (ruĝa) kun la semanto, kun surpreso 25000 mk., b) la 10 mk. pm. (blua) ankaŭ kun la semanto kun la surpreso 50000 mk. kaj c) la simila 5 mk. kun la surpreso 100000 mk. Rilate la pm. a) oni devas rimarki ke estas surprisita per la ciferoj 25000 mk. ambaŭ eldonoj, la pli granda kaj la malpligranda. Ankaŭ la ciferoj estas pligrandaj resp. malpligrandaj, konforme al la poŝtmarko.

Krome estas eldonitaj provizoraj poŝtmarkoj por la alpago „doplata“, nome: a) la 8 mk. pm. kun la surpreso 10000 b) la 20 mk. kun la surpreso 20000 kaj c) la 2 mk. kun la surpreso 50000. Ĉiuj „doplata“ estas malhelbluaj.

Pro la konstanta falo de la pola valuto kaj pro la enkonduko de la ora kalkulado depost la 1 januaro, la poŝto tarifo tre versajle estos ĉiam plialtigita. Tial oni prave povas antaŭvidi apardon de ĉiam novaj provizoraj poŝtmarkoj. La poŝtmarkoj valorantaj 1000 aŭ malpli da markoj jam estas premiaj de la oficejoj, versajle por uzi ilin kiel provizorajn.

Ni ĉiuj tamen esperu, ke la arego da provizoroj antaŭ nelonge aperita en Germanujo estos evitata en nia lando. Seriozajn eksterlandajn filatelistojn mi volonte informas pri polaj poŝtmarkoj.

Pawel Prabuski, Miloslaw-Polujo.
poŝtestro kaj landa prezidanto.

Plendoj pri malfruiĝo de ET.

Respondante al multaj plendoj diversflankaj pri malfrua ricevo de ET ni respondas, ke ni ne estas kulpaj pri tio. ET estas ankoraŭ ĉiam ekspedita vendrede kaj sabate. Malfruiĝo do estas kaŭzita de malbona funkcio de poŝto aŭ de specialaj malhelpoj en nia tuta regiono. — Por ŝpari tempon kaj monon ni ne respondos al apartaj plendoj skribaj.

Administracio de ET.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, flindka kaj kompleta informaro, ni bezonas scigiĝon (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo al la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, flinde, legeble (precipe nomoj)

Landoj.

Ameriko.

Brazilio.

Rio de Janeiro. La 15 decembro vespere, ĉe s-ino Adèle Duarte de Souza, prezidantino de la malnova asocio „Virina klubo“, okazis ĝenerala kunsido memora de la naskiĝa datreveno de Zamenhof. Post la kunsido oni ludis, kantis, deklamis kaj dancis.

La morgaŭan tagon kelkaj dekoj da ĝeesperantistoj kuniĝis ĉe salono de la Palaco de l' Comercio, kie funkcias la Komerca Asocio de Rio de Janeiro kaj la Federacio de la Brazilaj Komerciaj Asocioj. Ĝin prezidis D-o Reul Pederneiras, universitata profesoro kaj prezidanto de la Brazilia Gazetara Asocio. Legis la protokolon de la lasta vespermanĝo s-o Ismael Gomes Braga.

D-o E. Backheuser, universitata profesoro, legis interesan projekton pri la plej bona rimedo akceli la progreson de Esp. Sprite parolatis D-oj Heitor Beltrao kaj J. B. Mello e Souza kaj bonege deklamis poezion fino Maria Luiza Bocayuva.

D-o Theobaldo Recife entuziasme faris la oficialan paroladon pri la vivo de Zamenhof.

D-o Backheuser salutis D-on Reul Pederneiras, kiu dankis kaj faris toston je la memoro de Zamenhof.

Azio.

Japanujo.

Tokio. — Ĉe ĉiujmerkreda kunsido, vizitata de ĉ. 20 p. spite de malbona funkcio de tramvojoj, oni daŭrigas studon de „La Rabisto“ de Schiller. La 3 novembro okazis esp. kunveno en la medicina fakultato de Tokio Imperia Universitato en la lernejo. Ĉirkaŭ 40 fervoraj esperantistoj kunvenis. Nova grupo estis organizita de medicinaj profesoroj kaj studentoj tute sendepende al Teidai. Esp. Societo. D-oj Ošida, Niši, kaj Tamura kaj kelkaj studentoj faris interesajn paroladojn. Nun nova kurso estas gvidata de s-oj Okamoto, Ueda kaj aliaj kun 30 ĉeestantoj. Nova kurso komenciĝis la 13 nov. sub la gvido de s-o Akilama de Nippon Esperanto Gakuin.

Inuyama, urbeto proksima de Nagoja — Vespere la 19 okt. en la teatro Selezia en fama urbeto Inuyama sur Nippon Linio, ĵurnalo Hakutei aranĝis publikan kunvenon de propagando — Okazis paroladoj antaŭ 200 p.:

Malferma saluto de M. Hotta, ĉefred. „Kio estas Esperanto?“ de S. Ukaŭ, del. de Nagoja Esp.-Socia Klubo. „Tempo ne permesas nin dormi“ de H. J. Jamada, ĵurnalistino kaj internacia lingvo“ de K. Jasumi, ĵurnalistino de Sin-Aŭt-Sinbun. „Patriotismo kaj internacia lingvo“ de U. Mori, del. de Nagoja Studenta Ligo-Esp-ista (en Esp., interpretita de Joŝio Keŝi, liceano. „Konturo de Esp.“ de T. Saigo, del. N.E.S.K. „Verda Stelo“ de K. Kakesima.

Macue. — Post la katalikismo mi veturis el Tokio ĉi tien, kie ankaŭ la spirito de l' tempo tre favoras nian aferon. En la urbo jam sin trovas 9 samideanoj, kiuj kunvenis por la unua fojo la 20 sept. kaj fondis „Simane Esperantista Grupo“. Kurso komenciĝis de la 1 ĝis 7 nov. en Macue. Komerca Ĉambro; partoprenis 44 viroj kaj tri virinoj.

Propagando per submara ŝipo.

La „Revuo Orienta“ enhavas interesan raporton pri originala propagando, kiun ni jene represas:

Submara ŝipo N-o 45. Frumaten la 24 okt. nia ŝiparo ekkruzis al l' Cusima kaj Goto. Posttagmeze la 24 ni alvenis al Gō-no-ura, l'k insulo; ĉar ni ne kaptis nur unu nokton, ni havis nur tempon propagandi E-on al 20 ĉefaj personoj de la insulo. Sub-ŝt. infanteria Taneda promesis favore lerni la lingvon, kun ĉiama kontakto kun Sasebo Societo. Ni do provizis lin per diversaj libroj. — Vespere la 25 ni alvenis havenon Iuchara, Cusima insulo. La 26 mi iris kun nia samideano ing. vic-ŝt. Jamada al Cusima Liceo, kaj post kelka lekcio pri milita afero mi parolis pri Esp., kio kaŭzis fian ĝojon al la licea direktoro kaj lernantoj, ke mi devis fordoni al ili tutan provizon da libroj, kiujn kelkajn ni volis konservi por la vizititoj lokoj. En la urbo sin trovas kelkaj esperantistoj; S-o Cucui, prof. de la liceo estis iam malnova esperantisto, li promesas ĉi-okaze „revivi“ kaj komenci viglan propagadon. Vespere okazis bonveniga festeno de la urbi estraro kaj loĝantoj por la maristoj, ĉe kiu festeno la direktoro kaj ĉef-prof. de la liceo jam saviace propagandis Esp. al la insulestro, urbestro, direktoro de knabina liceo, k. a. La propagando de niaj novaj samideanoj tuj rezultiĝis en la fakto, ke la direktoro de ĵurnalo „Cusima Niĉi-niĉi Sinbun“ promesis helpi al nia movado kaj la direktoro de la meteorologia observatorio promesis lerni la lingvon.

Eŭropo.

Bulgarujo.

Varna. La grupo Frateco en komunuma kunveno decidis aranĝi amuzvesperon kaj ekspozicion dum la Verda Propaganda Semajno de 24.2.-23.5. Estas petataj ĉiuj esperantistaj redakcioj kaj ĉiuj samideanoj sendi gazetojn, afiŝojn, librojn ktp. Apartajn antaŭdankojn.

Ekspozicia Komitato Prafilksa, 24.

— Propaganda semajno estas fiksita inter 24. febr. kaj 2. marto. La grupoj preĝas por fari ĉion eble plej grandan propagadon. Ĉirkaŭero de la Centra Komitato invitas ĉiujn kolektiĝi monon por presigo de afiŝoj kaj propagandiloj.

Ĉeĥoslovakio.

Opava (Troppau). Klubo Esperantista Opava aranĝis du kursojn gvidatajn de s-o Horák, poŝta direktoro kaj vizitita plej parte de poŝtistoj. La sama esperantistigis oficeojn de poŝtoŝtacio Opava 2, kiun li estras. La 31 jan. 16 membroj de la klubo aŭskultis la radiotelefonan paroladon de s-o Pitlik el Praha. Aŭskultilon elibigis ĉi tie militista radiostacio. La ministerio de instruado disponigis por la klubo lerneĉambron en ĉeĥa burĝa lernejo. Kunvenoj jaŭde en kafejo Gross. — Sekr. Boh. Otava, Rochovans. n. m. 12, Opava.

Francujo.

Perpignan. La 17 jan. malfermiĝis esp. kurso por fraŭlinoj. 15 ĉeestis la unuan kurson gvidatan de nia fervora propagandisto s-o René Lech.

— „Amika Rondo“ malfermis praktikan kurson kaj esp. stenografian kurson laŭ la metodo Duployé-Flageul. Tiu kurso estas gvidata de s-o Jean Lech.

— „Pacamo“ esperantista propaganda oficejo (5 Rue de la Savonnerie, Perpignan) komunikas anoncojn kaj artikolojn la la gazetoj, kiu estas favora; propagandiloj

estas senditaj al la Komercia Ĉambro kaj al la urbkonsilistoj. S-oj Lech, direktoroj, aranĝos esp. karavanon por veturi al Vich dum Pentekosto 1924 (Kataluna Kongreso kaj Floraj Ludoj). Kongreso de la Mediteranea Federacio okazos certe en Perpignan je Pasko 1924.

Ceret. Ĉiujmerkreda kaj vendrede kursoj ĉe fervora s-ino Julia.

Etiage. Kursoj ĉi-vespere je la sepa ĉe la urbdomo. Jaŭde kurso por fraŭlinoj.

Sainte-Marie. Kursoj tri foje ĉiusemajne gvidataj de s-ino Duran.

Germanujo.

Coswig i. Sa. La 15 dec. la esp. grupo okazigis feston pro la naskiĝtago de nia majstro kaj pro kristnasko.

La vespero estis plibeligita per prezentado de artaj muzikaj kaj kantado de grupanoj el Weinböhle. En la saluiparolado s-o Dieze solenis la memoron pri nia majstro kaj s-o Nicolai faris paroladon „pri la vivo de la orkideoj“.

Sub la brilantaj kandeloj de la kristabele ornamita, Sankta Nikolao disdonis donacojn ĉiusepacin.

La vizito de cento da ĝeesperantistoj pruvis, ke la entuziasmo por nia movado estas granda.

Kreuznach. En la ĉelkunveno la 7 januaro estis ree elektata la malnova estraro kaj krome f-lino Margot Strauß kiel kasistino. Same akceptita propono de la prezidanto por ĉiuj membroj de februaro devige aboni „Germana Esperantisto“. Plue la grupo aranĝas en ĉiu 1. kaj 3. lundo dum monato devigan vesperon por la progresintaj lernantoj en kiu lernanto devas paroli pri iu libere elektita temo. Krom tio la grupo intencas aranĝi lertersperojn kaj ĝi petas la samideanojn kaj precipe la grupojn, sendi lerterojn, poŝtkartojn ĝis la 1 marto al „Deutscher Esperanto Bund“, Ortsgruppe Kreuznach, kiuj baldaŭ estos respondataj.

Gazetaro.

De Diamantbewerker (La Diamantlaboristo), Antwerpen. 19.1. Artikolo en Esperanto pri la rolo de la biblioteko de diamantlaboristoj. (Tre imitinda ekzemplo! Ni gratulas.)

Gazet van Mechelen, Mechelen, 9.1., 16.1. Pri Esperanto. Obchodni Obzor, Brno, 24.1. Pri „Ĉokolado“ laŭ ital. E. Revuo.

Pražky Večerník, 27.10.25. Esp. inter fervojistoj. Prager Presse, Praha, 17.8.23. Esp. felietono.

Reforma, Praha, 25.11. Pri Ameriko laŭ ET. L'Independant, 28.1. Pri fondo de intern. asocio de esp. stenografioj.

Informations, Paris. Organo de lernintoj de la Politeknika Lernejo, Paris. Polemiko kontraŭ kaj pledo por Esp. L'Humanité, Paris, 28.12.23. Pri Esp.

Schule und Elternhaus, Leipzig-Leutsch, dec. Pacifismo, Esp. kaj lernejo.

Reizen en Trekken, s'Hage, 15.1. Pri Esp.-kurso. Het Vaderland, s'Hage, 6.1., 8.1. Avizo pri kurso.

Narod, Split, 28.11.25, 5.2.24. Kun novaĵoj laŭ Esp. Informoj.

Publik. hung. gazeto el Subotica (Jugosl.). Pri foiro de Frankfurt.

Dos naje Lebn, Bialystok. Du numeroj kun artikoloj pri Zamenhof kun klišo.

Deutsche Rundschau, Bydgoszcz, 23.12.23. Pri Esp.-interpelacio.

Volkszeitung, Bydgoszcz, 4.1.24., 28.12., 14.12.23. Esp. anguloj. — 21.12.23. Resp. al min. resp. al la Esp.-interpelacio.

Tart. Gazeto, Kazan. Pri libert. de labor. laŭ ET.

New Jersey Post, Town of Union, 8.12., 14.12. Pri Esp. kaj 12.1. Festo de Hudson Esp. Societo.

The Courier Journal, Louisville, Pri Esp.

Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, 1.1. Alvoko al samfakanoj norvege kaj esperante.

5-a Ordinara Kunsido de Brazilia Ligo Esp-ista.

La 22 decembro okazis en Rio de Janeiro la 5-a ordinara kunsido de Brazilia Ligo Esperantista sub la prezido de s-o ing. A. Couto Fernandes.

F-lino Yrany Baggi de Araujo, dua sekretario, legis la protokolon de la lasta kunveno kaj s-o Odilio Pinto, unua sekretario, la raporton de la prezidanto kaj la bilancon de l' kaskisto.

Oni elektis s-ojn Carlos Domingues kaj Ismael Gomes Braga por kontroli la bilancon. La sekretario legis multajn lerterojn lasttempe ricevintajn kaj s-o prezidanto priparolis pri la kreado de Centra Komitato kaj la demandoj senditaj de la Konstanta Reprezentaro de la Nacia Societo. Oni aprobis la decidon de la lasta Universala Kongreso kaj elektis s-on J. B. Mello e Souza, kiel reprezentanton de Brazilia Ligo Esperantista ĉe la Konstanta Reprezentantaro.

D-o Mello e Souza dankis kaj proponis, ke oni sendu gratulan telegramon al s-o Medeiros e Albuquerque, unu el la pioniroj de la esperanta movado en Brazilio, pro lia elekto kiel prezidanto de la Brazilia Literatura Akademio.

Fine s-o prezidanto faris alvokon al ĉiuj brazilaj esp-istoj por ke ili ne forgesu kolekti monon por la monumento al Zamenhof.

Bibliografio.

Libroj.

Esperanta Biblioteko Internacia, Ellersiek & Borel, Berlin kaj Dresden, n-o 8 El Komedioj, n-o 13 Bulgaraĵoj, n-o 10 Japanaj rakontoj, n-o 17 Konsiloj pri higieno, n-o 27 La patrino, n-o 24 La Instituto Milner, n-o 25 Noveletoj al la nigra arbaro, 9,5x12 cm, prezo 0,25 or-mk.

Ĉiuj kajeroj estas represo de la unua eldono. La fakto pruvas la taŭgecon. La kajeroj rekomendas sin mem laŭ enhavo, aranĝo, presoj kaj kosto. Rekomendataj al ĉiu legemulo.

Esperanto-Magyar Szótár, de Dr. Takacz József, 1923. Kokai Lajos Kiadása, Budapest IV. Kammermayer Károly u. 3. 12x125 cm 184 pĝ. broŝ. kaj bindite.

Jen vortaro en hungara lingvo. Ĝi evidente forigas mankon en la hung. literaturo Esperanta, ĉar ĝis nun ne ekzistis tiuflaka verko. La vortaro estas tre klare kaj riĉenhava aranĝita. La presoj estas klaraj. Entute la vortaro enhavas ĉiujn avantaĝojn de plej novaj vortoj

libroj. Oficialaj vortoj estas signifitaj per stelo. La faka aparteneco estas montrita per respektivaj mallongigoj. Oni nepe devas rekomendi al ĉiu hungara samideano aĉeti la libron, necesas por la praktikado de Esperanto. La bindita eldono (nericevita de ni) kredeble estos ankoraŭ pli bone aranĝita. Oni petu katalogon de la eldonoj laŭ indikita adreso. R. A.

Az Esperanto Hivatalos Szegednek Sztótára, Dr. Toth Vince, 1925. 8x11,5 cm, kr. 1,20 broŝ. Hungara Esperanto Instituto, Budapest V, Eötvös u. 3. 128 pg.

Vortaro de oficialaj radikoj de Esperanto. Laŭ aranĝo la libroto similas al la germana samspeca eldono de Steier. Bonege resume sur malvalsa amplekso kun mallonga Esperanto-gramatiko la libroto estas tre taŭga helpilo al ĉiuj hungaraj esperantistoj. La suplemento enhavas klarigojn pri la vortfarado en Esperanto. Mi rekomendas la aĉeton al ĉiu intereso. Rosenic Anton, Horrem.

Ho, tiuj fremduloj! Opereto en unu akto, originale en Esperanto verkita de Feliks Hiller. 1925.50 pg. 11 1/2 x 16 1/2 cm. Eldonejo: J. ŠAPIRO, Białystok (Pol.).

Kiam kaj kie gajaj samideanoj solenojn grupan festeton, ili ludu tiun carman kaj ridigan komedion. Ses personoj subŝitas por la prezentado, sepa rolo de servisto estas ludenda de unu el la seso, sed estas nepre necese, ke ili ĉiuj bone sciu kisi kaj amindumi, vigle ludi kaj kanti laŭ allogaj melodioj, kiujn la aŭtoro mem komponis. — La teatraĵeto estas verkita en bonstila kaj facile komprenebla lingvo. G. Ajul.

Morgaŭ matene. Dramo en tri aktoj kun antaŭparolo de Fr. Karinty, el hung. lingvo tradukita de K. de Kalocsay, 1925, eldona de Hungara Esp. Instituto, 12x16 cm broŝ. 142 pg.

Jen traduko de dramo de unu el la plej famaj aŭtoroj de la moderna hungara literaturo. La nomo de la tradukinto garantias pri pli bona laboro. Oni povas rekomendi la dramon al ĉiuj intereso. pri hungara teatro. Preso kaj aranĝo estas bonaj. Nur la papero povus esti pli bona. Sed tio neniel influas la ĝenerale bonan verketon. O. Schutkowski, Frankfurt a. M.

Učebnice Esperanta, Dr. Gustav Zdrásky a Karel Procházka, 11,5x16,5 cm 352 pg., broŝ., eld.: Jindř. Bačkovský, Praha, Žitna u. 55.

Unu el la plej ampleksaj kaj detalaj lernolibroj, kiujn mi vidis ĝis nun. La libro sendube helpas pligrandigi la aron de bonaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio kaj ebligas dezirindan perfektigon de multaj ĉeĥaj samideanoj uzantaj la libron por ripeto. La libro enhavas detalan gramatikon kun metodoj klarigaj, dialogojn dulingvajn, frazeologion ktp. — unuvorte ĝi estas bonega eldonaĵo, pro kio oni povas gratuli la eldonintojn. Fr. Č.

Koncerta Kantaro. Eldonita de P. C. Brederode kaj K. Veldkamp (eldonejo P. Nordhoff, Groningen, Nederl.). Prezo: broŝ. 2,50 hol. guld., bind. 3,50 hol. guld.

Ĉiuj muzikemaj esperantistoj certe salutas tiun ĉi entreprenon de la eldonejo. La kolektaĵo ne nur alportas multe da ĝojo al ĉiu, sed precipe helpas beligi la esperantajn kunvenojn kaj festojn. Sed plej grava estos la kultura signifo de tiu ĉi kolektaĵo; ĉar ĝi prezentas intelektan ligilon inter la landoj en la muzika, ĉefe muzikscienca sfero, malgraŭ kaj flanke de ĉiuj aliaj intereso.

La nuna 1. parto (80 paĝoj) enhavas kantojn de Beethoven, Schubert, Mendelssohn, Schumann, Giordani, Bérart, Marini, Verhulst, Theodorus, Valerius ktp.

La presado de la notoj estas klara kaj senmanka. La tradukinto de la tekstoj, s-o Jan Ziemans, Scheveinghen, Holando, oni povas nur gratuli, kvankam kelkloke la vortoj povus pli bone enŝanĝi en la melodion. Tio estas malfacilaĵo, ĉiu certe ne ĉiam estas eblebla en la kantaĵo. La sekvanajn partojn oni povos ĝoje atendi. Hans Dahmen, Horrem b. Köln.

Gazetoj.

„Literaturo, London, okt.-dec.
L'Antinationaliste, Paris, n-o 2, nov.
Litova Sielo, Kaunas, dec.
Norvega Esperantisto, Kristiania, okt.
La Espero, Stockholm 1, nov.-dec.
Belga Esperantisto, nov.-dec.
Konkordo, Zagreb, sept.-dec.
Libereco, grupa gazeto, S. E. G. Kioto, Jap., nov.
Espero Tazofia, Praha, nov.-dec.
Tra la Literaturo, Dresden, dec.: Leginda gvidilo tra la nomita sfero.

La Suda Kruczo, dec.
France Esperanto, Paris, jan., n-o 6 (kun komerca aldon).
La Revuo Orienta, Tokio, n-o 12, dec.
Esperanto, Genève, (kun aldon „Bulteno“).
Sennacieca Revuo, Paris, jan.
Der Arbeiter Esperantist, Breslau VIII, jan.
Holanda Esperantisto, Zutphen, n-oj 105—108. Aperas nun en pli granda formato.

Marto, Haida, jan.
Informoj de EA de Estonio, jan.
Germana Esperantisto, Berlin, jan. Kun tre interesa rigardo al la Esp. movado en 1923.

Argus, Mexico.
Luzacia Observanto, Zittau i. Sa., n-oj 1 kaj 2. Nova 4-paĝa informilo en Esp. — Ni ĉiujas superflua la aperon, tiom longtempe, kiom la oficiala organo de GEA „Germana Esperantisto“ luktas pro sia ekzistado. Ĉiuj novfidoj nur disŝitas la ne iam ire grandajn fortojn de ĉi tiu movado en ĉiuj landoj.

Katolika Mondo, Graz, jan.-febr.
Weltidial Eemnes, (Mondlingvo) propaganda gazeto en nederlanda lingvo, nov.

British Esperantist, London, jan. Laŭ nova aranĝo.
International Language, jan. (eldono de BEA). Kun aldon „La juna lernanto“. Bonege aranĝita gazeto en angla lingvo. Oni devas gratuli la anglajn samideanojn pro ĉi tiu iniciato. Ĝi evidente grave helpas al la progreso de Esp. en anglingvaj landoj. Taŭvas treege por propagando de Esp. al ĉiuj medioj.

Progreso, Praha VII, jan.
La Interlingvo de I. P. T. T., jan.

Internacia Stenografisto, Issy, Seine, febr. Leginda enhavo faka. Pli bona aŭtografo estas dezirinda.

Bulgara Esperantisto, Sofia, jan. Pliampliksita.
Literatura Mondo, Budapest, jan. Kiel ĉiam kun modela enhavo.

Le Movado, Paris, febr.
Völker-Spiegel (Spekulo de popoloj) Esp.-organo en la servo de la raportado. Duonmonate po 10 orfenigoj. Eldonita de gazeta komisiono de laboristaj esp-istoj de Leipzig, Leipzig-Schönefeld. — Bonega ideo! La gazeto grave helpas al la disvastiĝo de Esp. en proletariaj landoj. Ne-laboristoj povos lerni de ĉi tiu iniciato.

Eklexi, Reviste Universal, Roma. En Interlingua (kun aldon de gramatikoj de nova, kredeble simpligita lingvo „Unilingue“). Pravas denove la superfluecon de pluraj sistemoj kaj ke Esp. estas la meza vojo.

JAM

**aperis la bonega originala
Esperanto-opereto
en unu akto**

Ho, tiuj fremduloj!

Teksto kaj muziko de Feliks Hiller.

52 paĝoj (6 da muziknotoj) kartonita.
Prezo 0.70 ormarko germ. aŭ 0.87 sv. frk.
Afrankite 1 sv. frk. aŭ egalvaloro.

Mendu ĝin en via librejo aŭ ĉe la

**Eldonejo J. ŠAPIRO, Lipowa 33,
Białystok, (Polujo).**

Kio estas S. A. T.

S. A. T. estas organizaĵo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda

S. A. T. estas perseranta aparato neniel poliika

S. A. T. kvankam utilcela laboristoversa, estas samtempe aliideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennaciecan spiritofostadon.

Kiajn organojn havas S. A. T. por plenumi tian taskon?

S. A. T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, ilustritan kun literatur-scienca aldon:

„Sennacieca Revuo“
(Redakcio: 24 Bould. Beumarchais, Paris XI; Administracio: Colmsstr. 131, Leipzig-Sitzb., Germanujo)

S. A. T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el tiuj „Faŭsto“ de Goethe kaj „Eklumo en Abismon“ de H. Barbusse estas jam aperintaj

S. A. T. eldonas Jarlibron, enenanta la adresojn de sia membraro, statistikon pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.

Kion jam faris S. A. T.?

S. A. T. okazigis 3 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein

S. A. T. vekis ĉe la Esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletarlando.

S. A. T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: S. A. T., 25 rue Boyer, Paris XX.

Ĵus estas presata

Eŭropo ĉe la abismo

de

Francesco Nitti

lama ministraro prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

Petu prospektajn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

**Frankf. Societät-Druckerei G. m. b. H.,
Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.**

Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

NI serĉas diligentan

kompostiston

kiu sufiĉe scipovas Esperanton, por la kompostado de ET kaj de aliaj esperantaj presajoj.

Presejo de „Esperanto Triumfonta“, Horrem b. Köln, Germanujo.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.

Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimumo du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭpaga. Anonceloj, ke ĉiuj ni povas deprezi la pagon de la abonanto, ĝuas por propra anonceloj prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.—mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikiĝo.

RUSAJ GESAMIDEANOJ! Ĝeparencoj de D-o Vincas Pietaris (Vikentij Petter) mortinta dum 1902 en Ustjuĝna, Novgorodskaj gub. serĉas linan familion, edzinon Marija Nikolajevna Petter kaj ĝefinojn — Georgio, Adolfo, Vikentio, Antonio, Marijo — kun celo interkonatiĝi. Eksciinte ion pri ĉi tiu bonvolu skribi al Kl. Naŭdzis, Mariampole, Litovio. [1]

MI DANKAS s-on Charles G. Stuart-Menteth, 51 Upper Bedford Place en London (Anglujo), pro alsendita esp. artikolo por loka nacia ĵurnalo, kiu estas enpresota. La ĵurnalo oni sendos al vi. S-o A. P. Drozdov, Karl-Lieb-knechtstr. 25, Ĉerepovec, Rusujo. [1]

LERTA FOTOGRAFISTA HELPANTO, 18 jara, kun bona atesto, serĉas postenojn longe daŭran en la lando parolante esperantan, hungaran, slovakajn kaj germanajn lingvojn. Perantoj estos nur pagataj post la efektiviĝo. Adreso: Ludoviko Löwinger, fotografisto, Nové-Zámky, Ĉeĥoslovakio. [1]

BANKOFICISTO, 24 jara (germ.), deziras oficon alilande (banko, grandfirmo). Laŭdaj atestoj fakaj scioj diverslingvaj. — Ges-anoj, perado! (elspezoj repagotaj). Pruvu praktikecon esperantan! — Esp.-grupo, por UEA 20190, Florinsmarkt 7a, Koblenz, Germanlando. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Stefano Pedrazzini, del. UEL, Locarno, Svisujo, interŝanĝas pk., gazetojn, esp. librojn kontraŭ poŝtmarkoj de ĉiuj landoj. [2]

Fotografisto interŝanĝas pm., aŭ sendas belan foton de historiaj kasteloj kaj de la milito kontraŭ pm. Li sin rekomendas por ĉiuj fotograf. laboro. Mia fratino interŝanĝas il. pk. S-o kaj f-lino Lenige, Angers, Francujo, 10, rue Ponts Cé. [2]

Poŝtmarkoj! 55 diversaj germanaj provizoraĵoj (5 mil-5 milionoj), neuzitaj kontraŭ antaŭa sendo de 1,50 dolaroj aŭ poŝtmarkoj de via lando laŭ sama valoro. Mi ne sendas unue. Herm. Albrecht, Köln, Germanujo, Am Zuckerberg 8. [2]

Interŝanĝon de il. pk., il. gazetoj, pm., (ankaŭ pli grandaj kvantoj), korespondado pri diversaj temoj, kun eksterlandanoj deziras s-o Wilh. Niebsch, Oels (Silezio) Kronprinzstr. 2, Germanujo. [2]

Fino H. de Veer, Abrikosstraat 58, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi per il. pk. kun interesaj vidindaĵoj. [2]

Fraŭlo Adalberto Laŭko, en Brašov, Rumanujo Targul Roselor n-o 15, deziras korespondi per il. pk. kun ĉiuj landoj, precipe Ekster-Eŭropo. [2]

S-o Lucacs Ajan, Cluj, Rumanujo, Calea Victoriei 89, sendas rumanajn pm. kontraŭ alilandaj. [2]

S-o J. Purn, Hradec Kralov, Ĉeĥoj, interŝanĝas pm. Respondas ĉiam. Aĉetas uzitajn pm. per 100 ekz.; ĉiutage petas nur proponojn kun specimenoj. [2]

S-o Hermann Kühn, (22-jara), instruisto, Ottmachau (Schles.) Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun gesamideano de la tuta mondo. Respondas ĉiam. [2]

F-lino Etele Kiss kaj Ladislao Kiss, deziras korespondi, interŝanĝi pm. kun gesamideanoj. Adreso: Pecs, Felső-Malom-u. 21, Hung. [2]

Likvoristo deziras korespondi kun samprofesiajnoj, ankaŭ kun aliaj samideanoj tutmonde. Adreso: Franjo Klakočar, Zrinjski trg. 18, Karlovac, Jugoslavio. [2]

S-o Ivan D. Dimčev, studento, ul. Miladinova 124, Varna, Bulg., deziras korespondi kun gesamideanoj, precipe ge-laboristoj, el ĉiuj landoj, pri diversaj temoj, precipe pri laborista movado. [1]

S-o Yrjö Rundberg, Hiekk, Vuorikatu 1, Helsinki, Finnlando, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. [2]

S-o Stefano Pedrazzini, del. UEL, Locarno, Svisujo, interŝanĝas pk., gazetojn, esp. librojn kontraŭ poŝtmarkoj de ĉiuj landoj. [2]

S-o M. Wieremicko, poezia Snow, p. w. Nowogrod Riezo fols. Tarekji, Polujo, deziras korespondi k. ĉ. l. per pk. ankaŭ por monoj kaj pm. nepra kaj ĵa respondado. [2]

S-o Walter Liebert, Oststrasse 140, Göppersdorf/Burgstädt (Saksujo), Germanlando, deziras interŝanĝi pm. kaj papermonon. [2]

Fervora esp-isto deziras korespondi kun tutmondo. Interŝanĝas esperantaĵojn kaj papermonon. S-o O. Sierig, Magdeburg, Wilhelm Kobelstr. 16, Germanlando. [2]

Mi deziras korespondi pri „Esperanto kiel kulturakcela kompreniĝo“ kun seriozaj ĝejnuloj de la tuta mondo. Fraŭlo Ernst Werner, Wien 17, Schulthessgasse 2, Aŭstrio. [1]

S-o A. P. Drozdov, Karl-Liebnechtstr. 25, Ĉerepovec, Rusujo, deziras korespondi kun ges-anoj de la tuta mondo, krom Rusujo, pri la evoluo de l' mondo, religio, esp-ismo kaj sperta populovideado. Preferas scienculojn. [1]

S-o E. Desch, popollerneja rektoro, Homberg (Niederrhein) Feldstr. 22, Germanujo, deziras korespondi kun ges-anoj speciale samoficajn ĉiulandajn pri nacia vivo kaj pri lernejoj kaj fakaj demandoj. [1]

Mi deziras liberperse korespondi per leteroj aŭ pk. kun ge-laboristoj pri: Pro kio kaj por kio ni vivas. Ne interŝanĝas pm. John Grönberg, Cobalt, Oni. Box 645, Kanado. [1]

S-o Edgars Blinš, Gertrudos iela 48, dz. 21, Riga, Latvio, deziras korespondi kun tuta mondo per bonaj il. pk. kaj l. Al ĉiu eksterŝanĝo sendos belan latvan il. revuon. [1]

Mi deziras interŝanĝi kun ĉiulandanoj pm., papermonon kaj il. pk. Mi respondas al ĉiuj kaj ĉiam. Laszlo Erno, Kaposvar, Mikszath utca 1, Hungarujo. [1]

Gegrupanoj, inter ili fotografistoj, deziras korespondi per il. pk. kaj l. interŝanĝi originalajn pejzaĝfotajn, pm. papermonon k. ĉ. l. ĉefe Nederlandajn kaj Danujo. Adreso: Vilhelmo Bleier, Ulpest, Virag-ut. 9 sz., Hungarujo. [1]

S-o Leŭtenanto Arturo Vilches, str. Thompson 141, Bahia Blanca, Argentino, deziras interŝanĝi pm. (ne sendu bagatelojn). [1]

So Vincento Orlando, str. Santa Fé 77, Bahia Blanca, Argentino, pm. (nur kun fraŭlinoj). [1]

4-500 malsamajn pm. mi sendas kontraŭ sama kvanto de via lando. Ankaŭ mi kolektas nelustritajn pk. Skribu la adreson bonelege. Mi certe respondas. Mi ankaŭ povas sendi papermonon germanan. E. Lenzbauer, München, Georgenstr. 62/2 r., Germanujo. [1]

Por 1 dolaro (aŭ samvalora mono) mi donas 50-100 pm. (ne kaj stampitajn). Bonvole registru sendaĵon! H. Wol-schmitt, Klenzstr. 99/1, München, Germanujo. [1]

La Esp. grupo Kreuznach, Germanujo, deziras pro ĝia lertversuaro korespondi kun esp. grupoj kaj esp-istoj el ĉiuj landoj. Skribajoj petataj ĝis plej malfrue la 1. marto al Deutscher Esperanto Bund. Organigrope Kreuznach, Germanujo. [1]

Korespondemuloj de eksterlando, precipe kun inoj. August Spürkel, Horrem b. Köln, Hindenburgstr. 22, Germ. [1]

S-o Erich Hums, oficisto, Körnersstr. 11, Oelsnitz, Vogtl., Germ., deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi donas bonajn pm. Respondas ĵu. [1]

S-oj Laz. Abramoviĉ, ul. Aktjabrjanskj Revolucij 1, Taganrol (antaŭe en Boku, Azerbajdĝano) informas siajn korespondantojn pri nova adreso. Pro daŭra vojaĝado multaj korespondantoj povos nur esti respondataj post kelka tempo. Li petas daŭrigi la korespondadon. [1]